266 PREFECTURE D'ALGER
SERVICE DES ARCHIVES

1re Année — 20 Novembre-5 Décembre 1905 — N° 16-17

5 Centimes — 5 Centimoj

LA ALĜERIA STELO

L'ETOILE ALGÉRIENNE

Petit Organe de Propagande Espérantiste de l'Afrique du Nord

BI-MENSUEL ★★★ DUONMONATA

Prix de l'Abonnement annuel

Algérie, Tunisie	2 fr. »
France	2 fr. 50
Etranger	3 fr. »

Kosto de la Jara Abono

Alĝerujo, Tunisujo	2 fr. »
Francujo	2 fr. 50
Eksterfrancaj landoj	3 fr. »

Les Annonces sont reçues à l'Administration du Journal, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prix sur demande

DIRECTEUR-FONDATEUR
Barthélemy BALS
ADMINISTRATEUR
Louis LANDES

La Anoncoj estas ricevataj al la Administracio de la Ĵurnalo, 57, rue d'Isly, ALGER.
Prezoj laŭ peto

ESPERANTO EBLIGAS AMIKECON INTER PLEJ MALPROKSIMIGITAJ HOMOJ

Alĝeriaj Notoj

Antaŭ nelonge, S-ro Roux, nia agema generala sekretario, ricevis la « Ateston pri Kapableco ». Ni tiom pli plezuras gratuli S-ron Roux pro lia sukceso, ke li estas unu el la plej spertaj kaj kleraj esperantistoj de la Alĝera Grupo. Sro Roux estas ankoraŭ tre simpatia kaj fervorega ano de la grupo, kaj ĉiuj liaj kungrupanoj estos kontentigitaj sciiĝante tiun sukceson, kiu estas la unua en la Alĝera Esperantistaro.

Alger ne veut décidément pas rester en arrière pour l'enseignement de l'Esperanto. En effet, quatre cours différents fonctionnent actuellement dans la capitale nord-africaine. Le premier (cours supérieur), est fait par M. Roux, récemment diplômé, tous les lundis, à 8 heures et demie, au Comité d'Hivernage ; le deuxième, professé par M Landes, a lieu tous les vendredis, à la même heure, à la Mairie d'Alger ; le troisième (professeur, M. Aubert), à l'Union Socialiste, tous les samedis, de 6 à 7 heures du soir : enfin le quatrième, professé par MM. Foussat frères, à l'Université Populaire. Tous ces cours sont assidûment suivis et nous ne doutons pas des rapides progrès que feront les élèves avec de si dévoués professeurs. — Un cinquième cours est en préparation à la Société de Géographie, mais seulement pour les membres de cette Société et leur famille.

M Aubert, le dévoué vice-président du Groupe Espérantiste d'Alger, a écrit et fait imprimer, à l'intention des ouvriers et des personnes qui auraient quelque peu oublié les règles grammaticales françaises, un petit ouvrage intitulé : « Introduction à l'étude de l'Esperanto et des langues vivantes ».

Ce livret, très bien compris, met à la portée de tous l'étude de l'Esperanto et nous ne pouvons que féliciter très chaudement son auteur d'avoir conçu son ouvrage en termes si clairs et si précis. ESPÉRO.

AL DIAJ LEGANTOJ ~~ AL DIAJ ABONINTOJ

Tre baldaŭ, nia gazeto atingos la finon de la unua jaro de ĝia publikado. Dum tiu tempo, ni faris ĉion eble por igi nian « Alĝeria'n Stelo'n » interesan per la publikado de artikoloj aŭ priskriboj pri tiu belega lando kiu sin nomas Alĝerujo. Ni publikis artikolojn pri Esperanto kaj pri ĝia disvastigado en fremdaj landoj. Ni same donis rakonteton pri la Esperantista Ekspozicio en Alĝero, kiu tiel bone sukcesis. Antaŭ nelonge, ni rilatis la Bulonjan Kongreson, kiu tiel grande resonis en la tuta mondo. Unuvorte, ni klopodis por igi nian ĵurnalon kiel eble plej interesa. Bedaŭrinde, pro la malgrandeco de nia formato, ni ne povis enpresi la nombrajn korespondojn pri Esperanto kiujn ni ricevis el fremdlandoj. Ni bonvolus ĉiujn kontentigi ; ĉu ni sukcesis ? Ni ne scias, Tio, kio estas certa, estas ke ni faris ĉion kio estis home ebla.

Ni provos alfari pliboniĝon al nia ĵurnalo, kaj publiki ok paĝojn anstataŭ ol kvar, kaj ni ĝin metos sub kovrilo, kiu taŭgos por ricevi la ĵurnalon nedifektita.

Sed, por tion fari, ni bezonas la helpon de ĉiuj. Ni bezonas ke niaj abonantoj ilin reabonu. Pri tio, ni memoru, ke ĉiu abonanto kiu varbos al ni kvin abonantojn rajtas sesan senpagan abonon kiun ni sendos al la montrita adreso. Tiuj abonantoj estos enskribotaj kiel protektantaj abonantoj de la « Alĝeria Stelo ».

Ni same estus kontentigitaj se ni havus kiel abonantoj la francajn kaj fremdajn

esperantistajn grupojn. Eble inter la grupanoj estas kiuj sin interesas pri Alĝerujo kaj estus tre feliĉaj legi artikolojn pri ĝi.

Ni, tie ĉi, dankas ĉiujn kiuj helpis nin en nia entrepreno, kaj precipe niajn kunlaborantojn Grafo Albert Gallois ; S-roj A. Baissac, Bézingé kaj P. Diffre, el Constantine ; S-ro Aymé, el Tlemcen ; S-ro P. Stoĵev, el Trojan (Bulgarujo), kaj ankoraŭ aliajn kies, pro manko da loko, ni ne povis enpresi la interesajn artikolojn. Ni esperas ke ili bonvolos daŭrigi ilian kunlaboradon kaj al ili ni tutkore diras : DANKON !

Tial ke la vorto Esperantisto konvenas al ĉiuj kiuj esperas, ni permesas al ni esperi la estontan sukceson de nia malgranda entrepreno, kaj ni diras, kune kun ili : ĈIAM ANTAŬEN ! LA REDAKCIO.

A NOS LECTEURS — A NOS ABONNÉS

Notre petite publication va atteindre la fin de sa première année d'existence. Pendant ce court laps de temps, nous avons fait tout notre possible pour donner à la « Alĝeria Stelo » une tournure intéressante par la publication d'articles ou descriptions sur l'Algérie, des comptes rendus de l'Exposition Espérantiste d'Alger et du Congrès de Boulogne-sur-Mer, qui a eu un si grand retentissement dans le monde entier. En un mot, nous avons essayé de rendre notre journal le plus intéressant possible. Malheureusement, à cause de l'exiguité de notre format, nous n'avons pu insérer les nombreuses correspondances concernant l'Esperanto que nous avons reçues de l'étranger. Nous avons voulu contenter tout le monde. Y avons-nous réussi ? Nous l'ignorons. Nous avons la satisfaction d'avoir fait tout ce qu'il nous était humainement possible de faire.

Nous avons projeté d'apporter une amélioration sensible à la publication de notre journal en lui donnant le format d'une revue et en publiant huit pages de texte au lieu de quatre. Ces huit pages seront sous couverture, ce qui évitera l'ennui de recevoir les exemplaires en mauvais état. Mais pour cela, nous avons besoin de l'aide de tous. Nous avons besoin que tous nos abonnés actuels nous renouvellent leur abonnement. Rappelons, à ce sujet, que tout abonné qui nous en procure cinq nouveaux est inscrit comme abonné protecteur du journal et a droit à un sixième abonnement gratuit que nous servons à l'adresse qui nous est indiquée.

Nous serions également heureux de voir les divers groupes espérantistes de France et de l'étranger devenir nos abonnés. Dans le nombre des « grupanoj » il en est certainement qui ont visité ou qui s'intéressent à l'Algérie. Ils trouveraient dans la « Alĝeria Stelo » des articles ou descriptions de ce magnifique pays, écrits spécialement pour le journal par nos meilleurs espérantistes.

Nous tenons à remercier ici tous ceux qui, de près ou de loin, nous ont aidés dans notre tâche, principalement nos dévoués collaborateurs : M. le Comte A. Gallois ; MM. A. Baissac, Bézingé et P. Diffre, de Constantine ; M. V Aymé, de Tlemcen ; etc., etc. Nous espérons qu'ils voudront bien nous continuer leur collaboration et nous leur disons du fond du cœur : MERCI !

Et puisque le nom d'Espérantiste convient à tous ceux qui espèrent, nous nous permettons d'espérer le succès prochain de notre entreprise et nous disons avec tous : ĈIAM ANTAŬEN ! LA RÉDACTION.

BIBLIOGRAFIO

PROVERBARO ESPERANTA.

Ni ricevis la unuan kajeron de la « Frazeologio rusa-pola-franca-germana », verkita de S-ro F. Zamenhof, kaj ĝian aldonon « Proverbaro Esperanta ». Ni tre gratulas la aŭtoron pro lia penso eldoni tiujn proverbojn kvinlingve. Tio eble taŭgos por la unueco de la ideoj de malsamaj popoloj, kiuj havas proverbojn kiujn ili malsame esprimas sed kiuj signifas saman aferon alimaniere diritan.

La esperantaj kajeroj estas vendataj po 20 kopekoj (50 centimoj) kaj la kvarlingve eldonita Frazeologio po 50 kopekoj (1 fr. 25), ĉe la aŭtoro, S-ro F. Zamenhof, strato Nowolipki, 3, Varsovio.

ESPERANTA STENOGRAFIO.

La presejo Moller kaj Borel, el Berlin, sendis al ni la « Lernolibron de Esperanta Stenografio », verkita de l' pastro Frederiko Schneeberger. Ni tre ŝatas tiun lernolibron, kies « bona sistemo devas servi al la stenografia praktikisto por skribi la plej rapidajn paroladojn », diras la antaŭparolo de tiu verko, « ĝi ne nur estas bela kaj simpla, sed ankaŭ tre kura kaj vere praktika stenografio ».

Lernolibro de Esperanta Stenografio estas ricevebla ĉe la aŭtoro, F. Schneeberger, Biel (Bienne), Svisujo, kaj ĉe Moller kaj Borel, Berlin (Germanujo).

MAJSTRO JAN HUS.

Ni ricevis ekzempleron de l' verko de S-ro J. F. Kuhn, « Majstro Jan Hus », la vivo, agado, kondamno de l' glora martiro.

Tiu tre interesa verketo estas antaŭparolata de S-ro Carlo Bourlet kaj kostas nur 0.85 centimojn. Gi estas eldonita de l' verkinto, Vrsce-Kopidlno, Bohemujo.

DIAB'O KAJ LA BELA DĴAZIA'O

ARABA LEGENDO

(Daŭrigo)

IV

La juna homo respondis : « Ho, Dĵazia'o, via lipo estas pli agrabla al la mia ol la freŝa fonto de la oazo post longega irado. Mi amas vin de la tago kiam mi vin vidis la unuan fojon kaj mia tuta estaĵo amtremas dum tia feliĉa kaj neatendita momento. Tamen, vi vidos ke mi estas inda je via tuta amo ; vi estas prava pensante ke mia respekto egalvaloras mian amon. Cetere, ni ne devas malrajdi ĉar morgaŭ la rajdistoj de nia gento sekvos niajn postsignojn kaj se ni estis altereniĝintaj, ili malbone parolus pri vi kaj suspektus vian virton. »

Ili daŭrigis do sian ĉevalan vojiradon la tutan nokton farante mil projektojn pri sia estonta feliĉado, kaj alvenis la duaron, nur la morgaŭon matene.

Vidante ke ili revenas ambaŭ, multaj Hilal'oj opiniis ke la bela filino estis eble doninta lian rekompencon al sia kuraĝa savinto. Ili sendis la rajdistojn por ke, sekvonte la ĉevalajn postsignojn, ili vidu se la du gejunuloj ne estis malrajdintaj. Post du tagoj la senditoj sciigis ke la postsignoj ĉie estas regulaj kaj sekve Diab'o kaj la bela Dĵazia'o, ie ne estis haltintaj.

Multegaj el la Hilalanaro estis kontentiĝinta de tiu sciigo kaj opiniis ke la juna filino kiel iam estis tiel virta. Aliaj ne povis kredi ke la bela Dĵazia'o tiel savita estis povinta malcedi al la deziro kiu, kompreneble, allogis ŝin al ŝia juna kaj kuraĝa savinto, aliparte ke juna viro kiel Diab'o estus siavice povinta kontraŭbatali siajn dezirojn por sia bela kaj ĉarma savitino.

Inter tiuj lastaj troviĝie khalif'o Zenat'o, batalanto timinda por sia kuraĝego, la plej potenca de le Hilala subgento, la Zenatanoj, kies estro li estis. De longedaŭran lempon, sekrele li amis Dĵazia'on kaj, pro ĵaluzeco, laŭte kaj kolere li pretendadis ke la filino estis pekinta.

Iom post iom, la du kontraŭanaroj malpacienciĝis ; la Diabanoj, defendantoj de Dĵazia'o, kaj la Zenatanoj opiniantaj kiel sia estro ; unue insulladis sin reciproke, post kio okazis verajn batalojn Dum du tagoj, rajdantojn oni vidis sur la ebenaĵo kaj ĉiufoje multenombraj mortiloj ne reeniris la tendojn.

Ĉagrenata de liaj mortigadoj, kiuj pereigis la plej bonegajn el la gentaj rajdistoj. Kalifo Zenato proponis al Diab'o ben Ghanemo elektita kiel estro de siaj partanoj, ke ili finu la malpacon per batalo nur inter ili ambaŭ.

Diab'o konsentinte, la morgaŭon ili dubatalis meze de granda rondo formita de l' du kontraŭanaroj inter kiuj la bela Dĵazia'o estis kvazaŭ prezidantino de tiu duelo okazinte pri ŝi.

La du batalantoj estis tiel bone kondukantoj de siaj ĉevaloj kaj tiel lertaj pri la skermado per glavo kaj ŝildo ke li balaladis la tutan tagon nevundite kaj nefaligite. Tiel ili daŭrigis sep tagojn, kiel la unuan fojon.

La okan tagon matene, por kuraĝigi sian amaton, Dĵazia'o al li sendis sian ĉirkaŭkolon. Diab'o ĝin ekprenis, ĝin haltigis ĝis sia buŝo, kisis ĝin, longe sorbis sian honodoron kiu estis tiu de lia amatino ; poste, antaŭ reekbatali metis ĝin ĉirkaŭ la kolo de sia ĉevalino. La duelo fine estis rekomencata sed, tuj la unuaj batoj, la Diab'a glavo glitante sur la ŝildon de l' kontraŭbatalanto atingis la ĉevalon de tiu ĉi. La bato estis estinta tiel forta ke la besto falis teren, mortigita.

Khalifo Zenat'o malrajdigite, la batalo ĉesis. Diab'o demandis kiam ili rekomencos, l' alia respondis ke li sciigos al li pri tio.

De tiu momento Zenat'o ekserĉis bonan ĉevalon, sed ne sukcesante ĝin trovi, li decidis ke li sendos sian propran filinon al Diab'o ben Ghanem'o por demandi ke tiu ĉi vendu al li sian propran ĉevalinon ; li bone sciis ke Diab'o ĝentilega kaj grandanima ne povus malakcepti ian virinan peton.

(Daŭrigota)

A. BAISSAC.

KONTOROJ DE SKRIBMAŜINOJ
1, Rue Colbert, ALGER
1, Place de la Bastille, ORAN
KOPIAĴOJ KAJ CIRCULEROJ
en Esperanto
Ĝiuj laboroj estas rapide kaj zorge plenumataj

ACÉTYLÈNE
Carbure de Calcium
T. GIRIAT & Cie
66, Rue Sadi-Carnot, 66
ALGER-MUSTAPHA
— **Téléphone** —

VOJAĜO ĈE OKCIDENTAFRIKAJ BORDOJ

Speciale Esperantigita por « Alĝeria Stelo »

UNUA PARTO

FORIRO EL MARSILIO ✣ ORANO ✣ LAS PALMAS ✣ DAKAR (Senegalo)
ALVENO AL KONAKRY (Franca Ginzo) ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣ ✣

— (Sekvo) —

Tiam, ĉiam laŭ antaŭ akordo, la malnovaj vojaĝantoj stariĝis antaŭe, kaj la novaj, kiuj nenion suspektis, stariĝis malantaŭe, precize sub la ponteto; mi ŝajnigis rigardi per fotografvitro, relevis la lignkurteno kaj ekdiris la kutimajn vortojn : « Atentu, plu movu ! » Tuj mi finis diri la lastan vorton, kvar maristoj, kiuj staris sur la ponteto, superakvis la novbaptatajn per akvo, antaŭe preparita en kvar grandaj marsileloj. Kompreneble, ĉiuj la malnovoj kaj la maristoj forte ridegis, dum male la aliaj, tute malsekigitaj, ekkriis kaj rapide forkuris.

Iom post iom, ili komprenis la ŝerĉon, kaj kune kun ni, ĉiuj ridegis; ili ŝanĝis akvumitajn vestojn, kaj tuj komencis sur la tuta vaporŝipo ĝeneralan feston kun dancoj, kantoj kaj fine ĉampana trinkeco, kiun pagis la novaj baptitaj.

La 6-an de majo frumatene, ni ekvidis Senegalajn bordojn, kaj je la 6-an horo n matene, la vaporŝipo ĵetis ankron en la haveno de Dakar.

Tuj mi malsupreniris teron por viziti urbon, kiun jam mi konis. Por tion fari, mi enŝipigis, kune kun tri aŭ kvar kunvojaĝantoj, sur enlanda barko, kondukita per nigraj maristoj, kaj, post kvin minutoj, ni alvenis elŝipiĝejon.

Dakar estas tre grava haveno; la urbo kuŝas sur speco de duoninsulo, kaj estas tre grava milita loko por la franca ŝiparo, kaj ankaŭ tre bona rifuĝejo por ĉiuj ŝipoj, kiuj marveturas ĉe tiuj bordoj. La lando estas plata kaj havas tre malmulte da arboj; la klimato estas varmega, sed ofte agrabla venteto refreŝigas la atmosferon kaj malhelpas tro suferi pro la grandaj afrikaj varmecoj.

Kiam ni elŝipiĝis, multaj enlanduloj ĉirkaŭigis nin por proponi siajn servojn kaj porti niajn paketojn, tute kiel ĉe Eŭropaj urboj.

La Senegalanoj estas altkreskaj, fortikaj kaj tre fieraj, ĉar ili estas francaj elektantoj; ĉiuj sufiĉe bone parolas francan lingvon, kaj iuj, pli bone instruitaj, estas oficistoj ĉe regadaj kaj privataj administracioj; aliparte, la Senegala enlandulo estas tre inteligenta, kaj facile li lernas ĉion, kion oni instruis al li.

(Daŭrigota). GRAFO ALBERT GALLOIS,
Membro de la Grupo de Alĝero kaj de la Nordafriko.

Leganoj ! Varbu al ni KVIN abonantojn kaj vi estos enskribota kiel protektanta abonanto al la « Alĝeria Stelo ».

Ni ankoraŭ sendos sesan senpagan abonon al kiu ajn persono kies nomo kaj adreso estos senditaj al ni.

GRAFO GALLOIS, en Riolunato (provinco de Modena) ITALUJO, deziras ricevi malnovajn poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Li sendos, interŝange, ĉiujn italajn poŝtmarkojn malnovajn kaj nunajn.

L'INSIGNE espérantiste Etoile Verte d'Emile GASSE INTERNATIONAL
est en vente dans nos bureaux, 57, rue d'Isly, Alger, au prix de **1** franc ; par poste recommandé, **1** fr. **15.**
Tous les Espérantistes doivent avoir l'**Etoile Verte.**

BONEGA OLIVOLEO EL "PROVENCE"
KAFOJ. - TEOJ. - ORANĜFLORAKVOJ. - PURA SAPO
Firmmarko : **L'Esperanto**
Petu prezarojn, specimenojn. — Speciala rabato al Esperantistoj por ĉiuj senperaj mendoj. — Agentoj akceptataj en ĉiuj landoj. — Skribu : A-te LANISSON, Salon (B.-du-Rhône) Franclando.
Por la Alĝeraj mendoj turnu vin al S-ro Louis LANDES, 57, rue d'Isly, Alger.

Le Gérant : MICHEL LLEDO. Alger. — Imp. J. TORRENT, 57, rue d'Isly.

Lettres accentuées de la Maison TURLOT, CHAIX et Cie, 128, rue de Rennes, Paris